Estrara interkonsiliĝo la 14an de januaro 2016, per Skajpo.

Partoprenantoj: Anne Karin Bondhus, Ulf Lunde, Mario Machlik, Herman Ranes, Hilde Dahlberg, Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Amelie Matt.

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 19an de novembro
Aprobita.

2. Ekonomio
Skagen Vekst nun valoras 47 421 kr.
Skagen høyrente nun valoras 127 674 kr.

La valoro de niaj akciaj fondusoj estas falanta. La estraro ne opinias, ke necesas fari ion pri tio, sed ni decidis ne meti pli da mono en tiaj fondusoj nun, ĉar ni timas, ke iliaj valoroj povos malkreski eĉ pli.

3. Jarraporto kaj jarkalkulo 2015
Kvankam ne okazas Landa Kongreso ĉi-jare, ni bezonas limdaton por la jarraporto kaj jarkalkulo.

La sekretario kaj kasisto klopodu pretigi ilin ĝis la 10-a de aprilo, tiel ke ni povos meti ilin en Norvega Esperantisto n-ron 3/2016.

La prezidanto metu noticon en Norvega Esperantisto n/ron 1/2016, petantan al la lokaj kluboj, ke ili sendu kiel eble plej frue raportojn al la estraro pri sia agado.

4. Planoj por 2016
a)
Cato Haugen registris novan adreson por sia komerca firmao. Necesas ankaŭ forigi la varojn (librojn) de tiu firmao el Esperantonia. La estraro atendas, ke Cato faru tion mem, antaŭ la fino de marto.

b)
Devas okazi seminario. La estraro elektu kelkajn temojn kaj invitu kelkajn personojn kiuj povos fari prezentojn pri tiuj temoj. (Vidu punkton 9 de la protokolo de la pasinta estrar-kunsido.)

c)
AKB demandos al la francaj esperantistoj ĉu ni rajtas traduki ilian novan broŝuron al la norvega, kaj eble ricevi grafikaĵojn de ili.

ĉ)
Laboro pri la nova vortaro. Necesas pretigi kaj ĝisdatigi la datumbazon, por fari retan eldonon de la nova vortaro. (La digitala vortaro ĉe esperanto.no estas nur provizora versio.)

Jørgen Bosoni respondecas pri la projekto. Se Jørgen havos tempon labori pri ĝi ĉi-jare, NEL petu 30 000 kr de la Legaco Uhlen por uzi kiel honorariojn al li por tiu laboro. Jardar E. Abrahamsen verku petskribon pri mono, subskribotan de Mario kaj unu alia estrarano (ekz-e Jardar mem).

Jardar sendos al ĉiuj estraranoj kopion de la norveglingva raporto (de 2011) de Kjell H. Ullestad pri la vortara laboro. (Ordboksarbeidet.pdf).

(Komento de la sekretario: Eble indas afiŝi partojn de tio en www.esperanto.no? Tie ĝi povus kapti la intereson de iu, kiu ŝatus helpi pri tia laboro!)

5. Datoj por venontaj interkonsiliĝoj
Ni decidis pri la jenaj datoj: 11/2, 10/3, 14/4, 12/5 kaj 9/6.

6. Eventualaĵoj
Herman Ranes raportis:

Dum la julferio mi estis en Esperantonia en Oslo kaj instaligis novan oficejan komputilon. Ĝi kostis 2930 NOK. (Ekranon, klavaron, muson ktp. mi ne elŝanĝis.) Mi ankaŭ aĉetis mikrofonon (por Skajpo k.t.p.). Ĝi kostis 389 NOK.

La malnova komputilo havis kelkajn problemojn kaj nestabilecojn, kaj mi konsideris estu bona ideo elŝanĝu ĝin antaŭ tuta paneo. La nova komputilo (Iwill Mini J2900) konsumas ege pli malmulte de energio ol la malnova (~ 15 W).

Mi petas la estraron kovru miajn elspezojn pri tiuj aĉetoj; entute 2930+389=3319 NOK. La kopiojn de fakturoj mi eventuale sendos al la kasisto.

Decido de la estraro:
En ordo!

La interkonsiliĝo daŭris de 19.30 ĝis 20.55.
Raportis Ulf Chr. Lunde.